


Jen Bulteno/64



ZACK

novembro

JEN-Bulteno Organo de la Junularo Esperantista de Nord-Ameriko
 Novembro, 1964

Sendu kotizojn al: Stanley F. Cohen, 16 Long Avenue, Allston,
 Massachusetts, 02134.

Sendu materialojn por la JEN-Bulteno portempe al Humphrey Tonkin,
 7 Linnaean St., Apt. 6, Cambridge, Mass. 02138 USA

Ĉi tiun numeron redaktis Humphrey Tonkin kaj Julie Crandall. Tajpis,
 Julie Crandall

Estraro de JEN:

Stanley F. Cohen Kasisto
Ann Bodine Sekretario
Humphrey R. Tonkin Komisiito pri Eksterlandaj Aferoj
Richard P. Kollin
Jonathan R. Pool
Robert Davis

Postenuloj de JEN:

Eileen Davis Sekretaria Helpanto
Ruth Weissman Sekretaria Helpanto
Joseph Chagnon Kasista Helpanto
Joseph Horn Kasista Helpanto
Gail Korb Kasista Helpanto
John Kooistra Kasista Helpanto

Reprezentantoj al JEN:

Arthur Morse Okcidenta Massachusetts
Naomi Sabghir Universitato de Maryland

JEN petas ke ĉiu alia junulara Esperanto-grupo sur loka aŭ lerneja
nivele elektu unu el siaj membroj kiel oficialan reprezentanton
al JEN. Sendu la nomon de la reprezentanto al la Sekretario.

Ĉiujn ĝeneralajn komunikojn oni sendu al la Sekretario --
F-ino Ann Bodine, 229 Sage Hall, Cornell University, Ithaca,
New York, 14850.

The arrival of a new JEN Bulteno so soon after the last one is a cause for reassurance. It is a sign that JEN has reestablished its routine. Now that our Bulletin is reaching the membership regularly, the time has come to ask ourselves again just exactly what we expect from it. Many of our members receive no other Esperanto publications -- in fact, even if they are members of ELNA this is currently the case. The responsibility of JEN to these members is very great. The Bulletin serves as a source of information, of ideas and of encouragement to them. If it is to do this job adequately, it has to reflect trends in the general Esperanto movement. But at the same time and for other reasons, the Bulletin must reflect the special interests of JEN members -- it must have individuality, because without individuality it becomes superfluous.

In one small bulletin it is not possible to achieve the ideal, and the Bulletin is bound to be inadequate to the needs of much of our membership. It is up to the membership to adapt it as it thinks fit. The way to do this is by contributing material and by making suggestions.

It is also up to the membership to supplement the JEN Bulteno with new and reading material from other sources. We are coming to the end of 1964. This is the time to think about subscriptions for 1965. JEN will grow in strength when the international movement grows in strength, and we therefore suggest that all JEN members think seriously about the possibility of joining the Universal Esperanto Association as individual members in 1965. Apart from the fact that the subscription is very low, membership in UEA strengthens UEA and helps produce more well-informed speakers of Esperanto. JEN and all other Esperanto organizations should aim at increasing the number of such people.

The Esperantist who can talk about Esperanto objectively and intelligently and in a well-informed manner is still something of a rarity. We owe it to ourselves to change this state of affairs.

- - - - -

La Internacia Junulara Kongreso, via kongreso, okazos en augusto en Kioto-Ootu, Japanio. Se vi neniam estis en Japanio, vizitu ĝin venontan someron. Esperanta bonvenigo atendas vin.

SHAKESPEARE, NIA SAMTEMPANO

- Tio estas la titolo de libro kiu lastatempe aperis en Usono tradukite el la pola. Verkis la libron, kies pola titolo estis Szkice o Szekspirze, la poeto, kritikisto kaj profesoro de literaturo JAN KOTT. Kott proponas al la leganto kaj spektanto de Shakespeare tute novan interpreton, kiu ligas Shakespeare kun la moderna "Teatro de Absurdo" de dramverkistoj kiel Ionesco, Beckett kaj Genet. Lia interpreto de Reĝo Lear formis bazon de la senprecedente sukcesa prezento de la dramo farde la Reĝa Trupo, el Stratford, Britujo - prezento kiu poste vizitis i.a. New York, Washington, Moskvo, Budapest kaj Varsovio. Kiam ajn malpravaj kaj konfuzaj estas kelkaj premisoj de Kott, sendube lia libro havis tre vivigan kaj entuziasmigan efikon en la studado kaj prezentado de Shakespeare. Jen ni prezentas mallongan ĉerpaĵon . . .

Historio en la teatro estas plejparte nur vasta medio; fono sur kiu la karakteroj amas, suferas kaj malamas; travivas la proprajn personajn dramojn. Kelkfoje ili implikiĝas en historion, kiu komplikas iliajn vivojn, sed eĉ tiam ne ĉesas esti esence ia pli-malpli nekomforta vestaĵo: peruko, krinolino, glavo kiu malhelpas la marŝadon interplektiĝante kun la piedoj. Kompreneble, tiaj dramoj estas nur supraĵe historiaj. Sed ekzistas dramoj en kiuj historio ne estas simple fono aŭ medio, en kiuj ĝi estas ludata, aŭ (pli precize) ripetata sur la scenejo, de aktoroj alivestitaj kiel historiaj personecoj. Ili konas historion, parkeris ĝin, kaj ne ofte iras malĝustan vojon. Schiller estis modela verkisto de ĉi tiu speco de dramoj. Marx nomis liajn karakterojn parolantaj trumpetoj de modernaj ideoj. Ili interpretas historion ĉar ili konas la solvojn kiujn ĝi proponas. Ili povas eĉ kelkfoje esprimi verajn emojn kaj konfliktojn de sociaj fortoj. Sed eĉ tio ne signifas ke oni vere dramigis historion. Oni dramigis nur libron pri historio. La libro eble estas idealista, kiel ĉe Schiller kaj Romain Rolland, aŭ materialista, kiel ĉe kelkaj dramoj de Büchner kaj Brecht; sed ĝi tamen restas libro.

La koncepto de historio kiun havas Shakespeare estas alia ol la du kategorioj menciitaj supre. Historio malvolvas sin sur la scenejo, sed

neniam estas simple ludata. Ĝi ne estas fono aŭ medio. Ĝi estas mem partoprenanto en tragedio. Sed kia tragedio?

Ekzistas du fundamentaj specoj de historia tragedio. La unua baziĝas sur la koncepto ke historio havas signifon, plenumas siajn objektivajn taskojn kaj gvidas difinitan vojon. Ĝi estas racia aŭ almenaŭ povas fariĝi komprenebla. Tragedio kuŝas ĉi tie en la kosto de historio, la kosto kiun devas pagi la homaro. Antaŭulo, homo kiu antaŭenigas la senhaltan rulon de historio, sed mem devas detruigi sub ĝi precize pro tio ke li vivis antaŭ la propra tempo, tiu estas ankaŭ tragedia. Jen la koncepto de historia tragedio kiun proklamis Hegel. Ĝi proksimis la opiniojn de la juna Marx, kvankam li anstataŭigis ĝin per la objektiva evoluigo de ideoj. Li komparis historion al talpo kiu senĉese fosas en la tero. Al talpo mankas konscio pri la destino, sed ĝi fosas laŭ difinita vojo. Ĝi revas, sed la revoj nur plej vuale esprimas ĝian senton pri suno kaj ĉielo. Ne la revoj determinas la vojon kiun ĝi sekvas, sed la movado de la ungoj kaj la nazo, kun ties konstanta fosado kaj skrapado. Talpo estos tragedia se ĝi okaze sufokpremiĝos sub la tero antaŭ atingo de la tersurfaco.

Ekzistas alia speco de historia tragedio, kies originó kuŝas en la konvinko ke historio ne havas signifon kaj ne moviĝas, aŭ nure ripetas ĉiam sian kruelan ciklon; ke ĝi estas elementa forto, kiel hajlo, ŝtormo, uragano, nasko kaj morto. Talpo fosadas en la tero sed neniam atingos ĝian surfacon. Naskiĝas konstante novaj generacioj da talpoj, kiuj disigas la teron ĉiudirekten, sed mem ĉiam premsufokiĝas. Talpo revas. Dum longa tempo ĝi konsideris sin lordo de la universo, pensante ke la teron, ĉielon kaj stelojn oni kreis por talpoj, ke ekzistas Dio de talpoj, kiu faris talpojn kaj promesis al ili talpecan eternan vivon. Sed subite la talpo konstatis ke ĝi estas simple kaj nure talpo, ke la teron, ĉielon kaj stelojn oni ne kreis por ĝi. Talpo suferas, sentas kaj pensas, sed ĝiaj suferoj, sentoj kaj pensoj ne povas ŝanĝi ĝian talpan sorton. Ĝi daŭre fosados en la tero, kaj la tero daŭre premsufokos ĝin. Je ĉi tiu punkto la talpo ekkonsciis ke ĝi estas tragedia talpo.

- - - - -

ESPERANTA POPOLDANCO

MARK MANDEL

Por la malamikoj de "roknrolo", jen estas respondo al la "Esperant-tvisto": la "Hoka Dupaŝo" ("Fishhook Promenade"). Al ĝi mankas propra muziko, sed la "Blackberry Quadrille" estas bonega. La komenca pozicio estas: duopoj en cirklo (la viroj centren), frontante malhorloĝe, kaj starante en promenpozicio.

- Taktospacoj 1-4: 4 dupaŝoj antaŭen (viro komencas maldekstrapiede, damo dekstre).
- Tsj 5-6: Turniĝu al la kunulo en renversan promenpozicion kaj 2 dupaŝoj antaŭen (horloĝe).
- Ts 7: Returniĝu en promenpozicion, kaj 1 dupaŝo malantaŭen (horloĝe).
- Ts 8: Ŝtampu trifoje.
- Tsj 9-15: Same kiel Tsj 1-7.
- Ts 16: Liberigu la manojn kaj ŝtampete turniĝu, frontante la kunulon.
- Tsj 17-19: 1 dupaŝo dekstren, 2 paŝoj antaŭen, 1 dupaŝo maldekstren.
- Ts 20: Turniĝu dekstren kaj frontu la kunulon.
- Tsj 21-24: Same kiel Tsj 17-20.
- Tsj 25-28 (la "Hoko"): Paŝpasu la kunulon ĉe la maldekstra ŝultro kaj paŝu malantaŭen-maldekstren por fronti la novan kunulon.

Ĉu iu popoldancmuzikema samideano povas komponi taŭĝan muzikon por ĉi tiu danco?

- - - - -

Se vi serĉas korespondanton en Usono, aŭ se vi estas usonano kaj serĉas korespondanton eksterlande, skribu en Esperanto al: "People-to-People", 2401 Grand Avenue, Kansas City, Missouri, 64108.

**TUTMONDA
ESPERANTISTA
ORGANIZO**

**La gepatra organizo
de J E N.**

UVERTURE

Estas malfacile transpreni prezidadon de la Organizo el la manoj de homo, kiu dum okjara funkcio tiom intimiĝis kun ĉiuj problemoj, agadmanieroj, mankoj kaj sukcesoj, kiom Günther Becker. Estas malfacile pro tio, ĉar dum lia gvidado la Organizo kelkoblis, modernigis, interne organize plifortiĝis kaj akiris rimarkindan prestiĝon ne nur en la esperantista, sed ankaŭ en la ĝenerala internacia junulara movado. Estas malfacile pro tio ĉar ĉio ĉi devigas repreni almenaŭ ne malpli rapidan kaj intencan marŝadon pluen. Tamen faciligon mi trovas en la fakto ke mi havas kunlaboron de ĉiuj kiuj kunlaboris kun mia antaŭulo, en la fakto ke mi daŭrigas bone komencitan laboron, direktan de kies evoluo signis la Baza Perspektiva Laborprogramo de TEJO.

El la taskoj, kiuj atendas la Organizon, mi menciuj nur tiujn, en kiuj ni bezonas plejan kunlaboron de la membraro.

En 19 Landaj Sekcioj kaj 12 landoj sen LS TEJO havas ĉirkaŭ 10.000 membrojn. Oni kalkulas ke ĉiujare minimume 15.000 gelnantoj lernas la Internacian Lingvon nur en lernejoj. Do, aliĝi nur unujaran lernejan kurson al TEJO, signifus duobliĝi ĝian membraron. Kaj tio ne postulus de ni persvadi

gejunulojn al Esperanto, nur aliri tiujn, kiuj jam estas esperantistoj. Kunlabore kun instruistoj kaj iliaj organizoj kaj kun UEA ni enkadrigu niajn klopodojn en la planon de Unesko "Asociiĝintaj lernejoj en Edukado por Internacia Kompreniĝo kaj Kunlaborado" kaj ni povos esperi ankaŭ je helpo de lernejaj aŭtoritatoj.

Malgraŭ niaj klopodoj Afriko restas ankoraŭ ĉiam pli-malpli ekster nia atingo. El ekster Afriko malmulton ni povas fari kaj malmultajn esperantistojn ni disponas en Afriko mem. Sed preskaŭ en ĉiu Europa lando studas Afrikanoj. Ilin ni devas atingi, inter ili agi. Des pli ĉar post reveno hejmen ili kiel plej alte edukitaj okupos tre influajn postenojn.

1965-a jaro estas proklamita en Unuiĝintaj Nacioj "Jaro de Internacia Kunlaborado". UEA jam organizis kolektadon de subskriboj por propono kiu estos submetita al la mondorganizaĵo. En tiu kolektado devus plenforte partopreni ĉiu nia membro, ĉiu junulo kaj junulino, senkonsidere la lingvan kaj organizan sperton. Krome, en prelegoj, studoj, diskutoj, manifestacioj kaj aliaj aranĝoj, kiujn oni organizos dum la jaro en la kadro de la kampanjo en unuopaj landoj, partoprenu niaj Landaj Sekcioj, niaj lokaj grupoj, junularaj delegitoj kaj ĉiuj niaj membroj, emfazante la problemon de internacia lingvo kiel gravan obstaklon en internacia kunlaborado.

Jen la tri taskoj, al kiuj, laŭ mia opinio, estus necese dediĉi en la sekvanta jaro plej grandan atenton, al kiuj estus necese koncentri ĉiujn niajn fortojn. La Komitato en Amsterdam formis komisionojn por plenumi ilin, sed estas necesa ankaŭ kunlaboro de ĉiu nia membro kaj tiam la sukceso ne forestos.

Ivo Osibov,
prezidanto de TEJO

TEJO-Kongreso.

La 21-a Internacia Junulara Kongreso okazos en Ootu (Kioto) de la 8-a ĝis la 15-a de aŭg. 1965. La kotizoj ĝis 1.4.65 estas: malpli ol 20-jaraj — 63,— ned. gld.; pli ol 20-jaraj — 70,— ned. gld. Detalaj informoj kaj aliĝiloj riceveblaj ĉe 21-a IJK, Kansai Esperanto-Renmei, 3-10 Nakatu-Hamadori, Ooyodo-ku, Osaka, Jap.

Malgrasa sed simpattia "junulara kuriero" dum tuta jaro kuradas al vi kun novaĵoj pri Madagaskaro kaj JEOM, se vi pagas 36 UL-stelojn al Eugène Raveloson, B.P. 1678, Tananarive. Poŝtekkonto 254-22- TANANARIVE.

RECENZO:

LA NOVAJ VESTOJ DE LA IMPERIESTRO kaj du aliaj fabeloj de H. C. Andersen

/Noveldonita: libro de Eldonejo KOKO, Kolby Kaas, Danlando. Kolorilustrita de Gustav Hjørland. Tradukita el la dana originalo de Ib Schleicher. Kontrolita de la Literatura Komitato de SAT. 52 paĝoj, el kiuj 24 tutpaĝaj kolorilustraĵoj. Formato 27 x 21 cm. Prezo 15,00 d.kr. (30 steloj) Eldonejo KOKO, Kolby Kaas, Danlando, 1964./

Ĉi tiu libro estas en sama formato kaj ekipo kiel La Marvirineto, kiu aperis en 1962 ankaŭ ĉe Eldonejo KOKO.

La libro konsistas el tri fabeloj de H. C. Andersen, en sama vesto kiel ĝia antaŭulo La Marvirineto. Tiu vesto, interalie, pravigas la ekziston de du tradukoj de la samaj verkoj. Ne malpli ol 24 tutpaĝaj kolorilustraĵoj, krom multaj nigre-blankaj, plezurigas la okulojn de la infanoj de ĉiuj aĝoj.

1. En "La Novaj Vestoj de la Imperiestro" H. C. Andersen satiras pri la homa snobeco kaj pri ĝia blinda fido al aŭtoritatuloj, kion fine malkovras naiva infano.
2. En "Hans-fuŝulo" ni renkontas la en fabeloj klasikan triopon, el kiu la lasta faras la heroon, kiu gajnas la principon. La du fratoj ŝajnas esti favoratoj al ŝiajmano kaj koro, sed venkas la "stulta", senperanima kaj gaja Hans-fuŝulo.
3. La tria fabelo "Estas tute certe" pritraktas nian emon triogl kaj klaĉi. Eble ĝi prenas la unuan rangon en la mondliteraturo pritraktanta tiun temon. Ne nur en la lando de H. C. Andersen oni, aŭdante triogon kaj klaĉon, sin esprimas per la signifoplenaj vortoj: "Estas tute certe!" Aŭtomate oni citas H. C. Andersen, kio montras la gravan edukon karakteron de la historio.

La samon oni cetere povas diri pri la unua fabelo. Vidante iun falsaĵon, kiu pretendas esti io tre grava, kaj pri kiu multaj miope gapas, oni en Danlando diras: "La novaj vestoj de la imperiestro!" - Tial, gepatroj! ne hezitu aĉeti la libron. Legu ĝin por viaj infanoj. Poste ili, se ili ne scias la lingvon, "relegas" ĝin fojon post fojo rigardante la amuzajn ilustraĵojn. La saĝo de nia granda poeto pli (daŭrigo sur p. 13)

PAĜO POR GELERNANTOJ

(El Popola Ĉinio)

- 9 -

(note: all but the simplest words are listed below. Compound words have their elements, but not their grammatical endings, separated off by '')

"Ankaŭ Vi Diris Prave"

Iun tagon, iu alvenis kolere al Afanti kaj akuzis la homon, kiun li malamis. Aŭskultinte lian akuzadon, Afanti kapjesis senĉese kaj diris: "Jes, jes, vi estas prava!" kaj poste li forsendis lin.

La sekvintan tagon, ankaŭ la akuzito venis al Afanti, kaj kontraŭakuzis la akuzinton. Aŭskultinte lin, Afanti same kapjesis kaj diris: "Jes, jes, vi estas prava!" kaj tiel li ankaŭ tiun forsendis.

La edzino de Afanti, kiu aŭdis ĉion kion la du homoj diris al Afanti, ekmokis lin dirante:

"He! kia viro vi estas! Al tiu, kiu hieraŭ alvenis, vi diris: 'Vi estas prava', kaj al tiu, kiu venis hodiaŭ, vi same diris: 'Vi estas prava', nenian distingon vi faras inter pravo kaj malpravo; nenian diferencon vi vidas inter korekteco kaj eraro. Kiel senkonscienca vi montris vin al la aliaj!" Aŭskultinte tion kaj meditante momenton, Afanti kapjesis: "Jes, jes, jes! mia edzinjo, ankaŭ vi diris prave!"

ankaŭ, too, also. prave, right. al'venis, came, arrived. kolere, angrily, in a temper. akuzis, accused. mal'amis, hated. aŭskultinte, having listened to. kap'jesis, nodded assent. sen'ĉese, incessantly, continually. poste, then, afterwards. for'sendis, dismissed. sekvintan, following. akuz'ito, accused. kontraŭakuzis, countercharged. akuz'into, accuser. tiel, likewise. aŭdis, (had) heard. ek'mokis, began to scorn. hieraŭ, yesterday. hodiaŭ, today. distingo, distinction. mal'pravo, wrong. sen'konscienca, demoralized. la aliaj, others. medit'inte, having meditated, on meditating. edzinjo, dear wife, wifie (!)

Paĝoj por geknaboj...


reĝo

kaj

Iam post longe en iu
La reĝo havos tri filinojn
kaj unu stultilon



fora lando estos reĝo.
, tri konsilantojn
Kelkfoje la reĝo estos



feliĉa, kaj kelkfoje malfeliĉa, aŭ trista
Sed plej ofte li estos malfeliĉa, ĉar li estos reĝo, kaj
ĉiu scias, ke reĝoj estas tre malfeliĉaj. Al almuzulo neniu havas
motivon por mensogi, sed reĝo neniam scias, ĉu oni parolas al li la ve
ĉi tiu reĝo pro tio multe pensados pri vero, kaj sendese demandas al s
kiel li plej certe povos eltrovi la veron pri tio aŭ alio.

Venos la tempo, kiam la reĝo maljuniĝos, kaj kiam li
devos edzinigi siajn ĉarmajn filinojn al taŭgaj
princoj. Li decidis unu wagon, kuŝante en si
majesta reĝa lito, ke plej grandan parton d



sia bonhavo li dotos ne al tiu filino, kiu estas plej bela aŭ plej aĝa
sed al tiu, kiu plej amas lin. Sed kiel eltrovi, kiu el la tri filino
plej vere lin amas (aŭ vere lin plej amas)? Jen dilemo. Same kiel ĉ
kiam li sidas en dilemo, la reĝo alvokos siajn reĝajn konsilantojn. L
konsilantoj kompreneble venos. "Vi" diros la reĝo, per reĝa tono,
"diru al mi, kiel mi certe eltrovu tiun mian filinon, kiu p
malte amas min." La konsilantoj interkonsiliĝos. "Via suverena
moŝto" respondos hezite la plej eminenta kon- silanto,
"vi certe scias, ke ĉiuj viaj filinoj amas vin per amo senfina kaj ne-
mezurebla." La reĝo, kiu ne estos tiel stulta kiel li aspektos, ŝajn-
iĝos, ke li ne addis. Tial la konsilantoj reinterkonsiliĝos. "Ni
rekomendas, plej ekscelenca monarĥo, estro de tago kaj nokto" ili fine
baĭbutos, "la jenan provon. Vi donigu al ĉiu filino po unu globkrajon
(el pura oro, havebla ĉe ĉiuj pli bonaj amasvendejoj) kun ordono, skri
poemojn pri sia amo al la patro. Tiu, kies globkrajono plej rapide
eluziĝos, estos mamevidente tiu, kiu plej amas vin."
La reĝo, kiu estos tamen preskaŭ tiel stulta kiel li aspektos, tuj
tuj ordonos plenumi la sugeston.






Post taŭga intervalo, kiu dependos de la tiama kvalit
de la globkrajonoj, la iom velkintaj princoj revenos
antaŭ la reĝon. "Ho neordinara personego, kiun gloras
la montoj kaj la maroj" rekomencos la plej eminenta
konsilanto, "la provo estas jam finita. Tiu, kiu plej
kore vin amas estas via plej aĝa filino Ruzulino."
(Estante plej inteligenta, ŝi oferis la kvaliton al la kvanto de siaj
poemoj.) "Ve, vi abisma idiotego", krios la reĝo, iom
ekscitita. "Kiel vi povas imagi, ke tia ridinda provo ion
pruvas pri la amo?! Forigu lian korpon! (Tiutempe, la morto-
puno estos tiel terura, ke ne la kapon sed la korpon oni fortranĉos).
Tiun punon oni kompreneble tuj plenumos.




stultulo

Post tiu ĉi fusaĵo, la reĝo enfermos sin en sian plej
 sanktan sanktejon, kaj pensos.  Post treege longa pensado li
 fine decidis alvoki sian stultulon. "Servisto!"
 li diros al servisto, "alvokii mian stultulon!"

"Vi" diros la reĝo, per reĝa tono, "diru al mi, kiel mi certe
 eltrovu tiun mian filinon, kiu plej multe amas min." La stultulo, kiu
 ne povas interkonsiliĝi kiel la konsilantoj, simple staros
 tie, kvazaŭ stultulo.  "Ho kara kaj noblega reĝo", li
 ŝercos, "la provo estas tre tre facila. Vi nur venigu la
 ĉie laŭdatan princon de East Grinstead" (prononcu: aŝbidelazuŝ) "kaj
 tiu el la du pli junaj filinoj, kiu pli multe plaĉos al li, estos tute
 certe indiko pri la solvo." Aldinte tion, la reĝo rigardos iom
 strange la stultulon, sed fine ordonos, ke oni alvoki la
 princon. 

La princo estos efektive tre eleganta kaj laŭdinda persono
 Preskaŭ senhezite li elektos la plej junan filinon, kiu
 estos cetere plej bela kaj tiel plu.  Ekregos silento en la
 kortegeto. Fine la reĝo turnos sin al la stultulo,
 kaj eksplosos: "Ĉu vi do aŭdacas diri,
 ke tiu infanino plej multe min amas, nur pro tio, ke al
 tiu reĝidaĉo ŝi plej bone plaĉas?! Novan stultulon, tuj!"
 "Momenton!" respondos la senkorpigota stultulo, iom aplombe
 "tion mi ne diris. Mi diris nur, ke la elekto de la princo
 estos indiko pri la solvo. Tiu filino, kiu plej kore vin amas,
 estas ne tiu plej juna, sed la dua filino." (kiu nomiĝos Fred).

"Mirinde!" ekkrios la reĝo, mirigita  "sed kiel
 do vi scias tion?"

"Tre simple" respondos la stultulo. "Bone mi konscias, ke
 nur vi, ho lordo de ĉiuj viaj servistoj, estas kapabla atingi tian
 profundan scion pri la homa koro. Nur vi kapablas vidi la internajn
 ideojn de viaj filinoj. La elekto de la konsilantoj evidente ne
 kontentigis vin. Mi do aranĝis, ke iu elektu inter la du pli junaj.
 Ankaŭ tiu elekto ne plaĉis al via senkompara saĝo. Mi do konkludis,
 ke la restanta filino plej multe vin amas, ĉar tion montras via propra
 koro. Tion farante, mi agis nur kiel spegulo, kiu permesas al la reĝo
 vidi per propraj okuloj sian grandiozan belecon."

Tiu ĉi kantaĵo ĉefi gajigas la kompatindan reĝon, ke li tuj
 mortos. La princo de East Grinstead edziĝos al la princino Fred, kiun
 li ne malde ŝercas, kaj faras reĝo. Tiam ĉiuj penos forgesi pri la
 tuta afero. Ekde tiam okazos penas tiel, sed pri la estonteco oni ja
 ne povas esti ĉiam certa.

Originale reverkis:
 Bhiktor Sedlar

LETEROJ KIUJN ONI NE SKRIBAS AL MI

Mandragoro

Kara fratineto,

Sciante ke vi ĉiujare volas iri al la Universala Kongreso kaj ke eta Joĉjo estas ankoraŭ tro juna por la Kongreseto, ni volonte lin kunportos kun ni al la marbordo dum la unua semajno en aŭgusto, tiel liberigante vin.

- via frato, Karlo

Estimata sinjorino,

Ni konstatis ke ni faris gravan eraron. Enpago de 4000 steloj kiun vi faris en novembro 1957 estis neniam registrita en vian konton, kaj pro tio ni erare informis vin antaŭ nelonge ke vi havas deficitan saldon en via konto. La eraron ni nun ĝustigis, aldonante procentaĵon por la koncernaj sep jaroj, kaj ni sendas al vi niajn plej sincerajn pardonpetojn.

- Centra Sparbanko

Kara membrino,

Denove la landa Esperanto-organizo faris bonan profiton ĉi-jare, kaj denove duobligis sian membronombron. Pro tio ni decidis ke tiuj niaj anoj kiuj jam fidele pagis siajn kotizojn dum la pasintaj kvin jaroj ricevu senpagan membrecon dum la venonta jaro. Ni trovas ke vi unue membriĝis en 1957 kaj do kun plezuro ni ĉi-kune sendas vian membrokarton por 1965.

-*****a Esperanto-Asocio

Estimata civitanino,

Ni hieraŭ fine decidis igi vian straton unudirekta kaj radikale ŝanĝi ĝian nunan formon. Rezulte de rekonstruo de la vojo, ni povos kun plezuro redoni al vi la sesmetran areon kiun ni forprenis de via ĝardeno en 1960. Niaj dungitoj jam traforkis la areon kaj plantis tie kelkajn centojn da asfodelaj bulboj. Ni esperas ke tio estas en ordo.

- La Loka Trafika Konsilantaro

(daŭrigo sur p.13)

(daŭrigo de p. 12)

Kara amikino,

La kampanjo por starigi monumenton al Zamenhof ĉn la urboplaco tiel bone sukcesis, ke ni devas kun pardonpetoj resendi al vi vian kontribuaĵon kiel ne plu bezonatan. Jam la mono kolektita sufiĉos ne nur por la monumento mem, sed ankaŭ por konstrui klubejon por nia Esperanto-Klubo kaj komenci bibliotekon.

- La Urba Esperanto-Klubo

Estimata eksstudentino,

Via peto pri starigo de katedro de Esperanto en nia universitato venis precize ĝustatempe. Rezulte de la mirinda kresko de intereso pri Esperanto en la universitato, la Senato decidis starigi apartan Esperantan katedron kiu funkcios ek de la venonta jaro. Bedaŭrinde ni devos komence limigi la nombron de studentoj al 300, sed ni antaŭvidas duobligon en la posta jaro. Jam ni ricevas sufiĉe da enirpetoj de niaj studentoj por tio.

- Sekretario de la Universitata Estraro.

Kara abonantino,


Ni bedaŭras informi vin ke denove la printempa numero de nia gazeto fruas, tiel ke vi ricevos ĝin jam du monatojn antaŭ la ĝusta dato. Ni esperas iel ĝustigi ĉi tiun mankon niaflanke sed nuntempe ne vidas eblecon.

- La redakcio de "Monda Vulturo"

(daŭrigo de p. 8)

malpli penetras en ilian menson. Kaj ĉu gepatroj povas doni al siaj infanoj, - cetere ankaŭ al si mem kaj al aliaj - ion pli valoran ol vivosaĝon prezentitan en maniero tiel, ke vole nevole ĝi eniras la sangon kaj faras la leganton almenaŭ iomete pli valora kiel homo? Tiu libro simple estas perlo en la mondliteraturo.

(Peter Zacho)



Do bone! Se vi forigas viajn anojn, mi proponos vin por la Pacpremio.

EL NIA POŝTKESTO. . .

"Mia vivo estas feliĉa. Mi baldaŭ transloĝiĝos al alia apartamento kiun mi dividis kun Turka instruisto. Mi instruas 28 horojn semajne kaj la planado kaj instruado estas nune iom malfacila ĉar mi ne alkutimiĝis al la laboro kaj la infanoj ne al mia fremda instrumaniero. La socio estas ege konservativa: nur en la lastaj jaroj neakompanataj virinoj eliras sur la stratojn, kaj ankoraŭ 99% estas tute kovritaj escepte ĉe la okuloj kaj nazo. Sed alia parto de la konservativeco estas la ĉiea respekto kaj gastamo montrataj al fremduloj kaj al gastoj. Kompreneble estas pluraj novaj kutimoj al kiuj mi penas adaptiĝi sed homoj estas tre helpemaj tiurilate. Mia urbo estas bela, situas sur la flankoj de monteto kun kastelo antikva sur la supra. Estas en ĝi ĉ. 20,000 homoj. Vino kaj ŝarg-aŭtado estas ĝiaj industrioj. Turkoj opinias ĝin aĉa loko (mankas interesaĵoj, distraĵoj, gravaĵoj) kaj volas fuĝi aliloken, sed mi trovadas multajn farenadaĵojn kaj tial kontentas."

- Jonathan Pool, nova packorpusano en Turkio.

"Estimata Sinjoro Redaktoro,

Fi kaj aĉ dekmilfoje! Kia emego inter la esperantistoj senĉese senkiale sencele ŝanĝadi aŭ aliigi ĉiujn erojn de nia lingvo! Vigle mi malkonsentas kun la verkinto de via artikolo Kial mi malamegas "Usonon", kiun reprenis Kial Ne?

Se li skribas sur koverto "Ŝtat-Unio (Usono)", iu malpli urĝa aŭ pli hezitema povos interkrampe aldoni kelkajn pliajn nomojn (variantojn) (variojn) (eblajn dirmanierojn) (proponaĵojn) (vortformojn) (esprimmanierojn por la samo). Sendube tio grave plisimpligus la legadon de la adreso.

Sed kial "Usono" ne taŭgas? Neniel ĝi estas ofenda por la usonanoj; tute male. Ilia regno estas la sola ne havinta propran nomon geografian aŭ gentan, kiu ricevis tian en la Internacia Lingvo.

(daurigo sur p. 16)

(daŭrigo de p. 16)

Efektive neniu atentis, dum li uzas ĝin, ke "Usono" prenis siajn literojn el "United States of North America", sed ĉiu konstatas ke ĝi estas unuradika vorto, precize kiel Brazilo aŭ Nederlando. La usonanoj povas fieri, ke ili en unu jarcento starigis nacion tiel vivan kaj gravan, ke ilia lando kvazaŭ nature ekhavis apartan nomon en la naskiĝanta lingvo dum USSR, Sud-Afriko aŭ UAR tion verŝajne neniam atingos.

Pri la "aĉ-aspekto" de la vorto kiu konsentos? Zamenhof, nisi fallor, plurfoje trafe respondis al tiuj mallarĝcerbuloj, kiuj dekretas vorton "stranga" nur, ĉar ili ne ĝin kutimas.

Ĉu "kial ne" aŭ "jen" estas forigindaj el la lingvo, ĉar tiuj, kiuj ne konas ĝin, eĉ ne komprenetas ilin? Cetere "United States" estas (ne kiel "Usono") nur du vortoj el la komuna aro: oni tradukas ilin de lingvo al lingvo, kaj ili fariĝas nerezoneblaj laŭaspekte.

"Etats-Unis" signifas precize la samon, kiel "United States", t.e. "unuigitaj" aŭ "unuigintaj ŝtatoj". Mi ne kuraĝas malpermesi la uzon de "Unuigintaj Ŝtatoj (de Ameriko)" al tiuj, kiuj ial ne deziras doni al Usono ĝian nomon. Sed "Ŝtat-Union" oni devas sufoki antaŭ, ol ĝi eliris la lulilon, almenaŭ tial, ke "unio" ne estas esperanta vorto. Mi preskaŭ kuraĝus ĝin nomi kontraŭfunda-menta, ĉar ĝi nenion alian signifas ol "unuigo". Ankaŭ "Ŝtat-Unuigo" ne ŝajnas al mi bona, kiel nomo de regno, ĉar oni povas bezoni ĝin por aliaj uzoj; por Usono ĝi certege ne estas bezona: tiu lando jam estas delonge nomita.

(daŭrigo sur p. 17)

(daŭrigo de p. 16)

Noteto pri USSR - La franca mallonga formo estas "Union soviétique", sed pli ofte ni diras "URSS" (ŭereses aŭ eĉ ŭrs). Ĉu la esperanta devas esti "Sovjeta" aŭ "Soveta Unuiĝo"? Pro nekono de la rusa kaj praslava lingvoj, mi ne havas firman opinion; mi pli emus al la unua, sed ŝajnas, ke "Soveta" estas pli ĝenerale uzata.

- Francisko Simonnet (Parizo)

A N O N C E T O

Por scienca laboro, mi kolektas lernolibrojn pri MAŜINDESEGNO en diversaj lingvoj.

Ĉiu, kiu sendos al mi maŝindeseĝnajn librojn en kiu ajn lingvo, ricevos specialan donacon aŭ kion li (ŝi) deziras.

- Enjo Daskalov
Tekstila teknikumo
Vraca, Bulgario

U.E.A. signifas ne nur "Universala Esperanto-Asocio" sed ankaŭ "universala Esperanto-agado". Subtenu la laboron de UEA, sciu kio okazas en la Esperanto-mondo, fariĝu bone informita esperantisto. Por informoj skribu al la usona reprezentanto de UEA, Donald E. Parrish, 328 West 46th Street, Los Angeles, California, 90037.

LA LINGVA KAOSO

*
*
*
*
*

kompilita
de Mandragoro

Ĉu estas kuracisto en la halo? --

"Certe la komparo de diversaj lernejoj interesis multe,
pro tio ni atendas senpaciente la reporton de nia reprezentantino."

- HEJS-Bulteno, majo-junio 64

"La unua esperantovortaro en Hindujo aperas en Cejlono en la sin-
gala lingvo."

- Edukado Internacia 28 julio 64 (-Kian geografion vi instruas?)

SE ĈIU EL NI VARBUS NUR UNU PO JARO POST NURA JARDEKO VERDIĜUS
LA HOMARO!

- HEJS-Bulteno (-pro naŭzo?)

"Por la unua fojo en la historio de Liberio, S-anino Elizabeth
Collins estas elektita kiel senatanino." - Heroldo de Esperanto,
20 jul. 1964

(daŭrigo sur p. 19)

(daŭrigo de p. 18)

"At the advanced discussion group each person was asked to write the title of a subject for discussion on a slip of paper. Among the subjects discussed were the following:

1. Esperanto and the sea.
2. The fishing industry in Bridlington.
3. Shirt buttons.
4. The faithful hound: Is it any longer?
5. Water.

Approximately thirty-five Congress members attended, and the debate waxed very vigorous... The hour passed only too quickly and many interesting subjects had to be abandoned because of lack of time."

- British Esperantist July-August 64

(Thank God for that!)

- - - - -

"Mi dediĉas mian tutan vivon al la triumfigo de Esperanto, senrezerve; sed kontraŭ la ektuŝo de la Fundamento de nia kara interhoma lingvo, mi batalas kun la tuta energio de mia juna temperamento. Mi esperas el mia tuta koro, ke baldaŭ montriĝos, ke Monda Kulturo ne povas sin vivteni...Jes, la lingvo de Monda Kulturo vere naŭzas min..."

- Monda Kulturo printempo 64

- - - - -

"The Editor expresses his regret for an error which occurred on page 302 of the September issue... In column two the report headed 'International League of Blind Esperantists' should have read 'Kristana Esperanta Ligo Internacia' "

- British Esperantist Oct 64

LERNU ESPERANTON: LINGVO DE TUTMONDA INTERKOMPRENO !!